

Aprobata Laborplano de ILEI laŭ grupoj de similaj temoj

Grupo 1: internaj kaj rutinaj taskoj

- 1) Restarigo de la administra sistemo de ILEI kaj prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto
- 2) Renovigado de la retejo de ILEI
- 3) Dokumentado de la renovigado de la retejo de ILEI
- 4) Kreado de la paĝoj pri IPR kaj JA en la retejo de ILEI
- 5) Regula prizorgado de la retejo de ILEI



Grupo 2: Eldonaĵoj, retaĵoj, kunsidoj kaj interrilatoj

- 6) Publikigado de IPR
- 7) Publikigado de JA
- 14) Daŭre verki trimonatajn raportojn
- 9) Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-an de decembro)
- 11) Realigado de libro pri Premio La Torre, se eble kun la ISBN-kodo de ILEI
- 12) Publikigi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj 2020-1, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI
- 13) Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI
- 15) Teni bonajn rilatojn kun UEA
- 16) Teni bonajn rilatojn kun TEJO
- 24) Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatoj
- 25) Daŭre okazigi ILEI-forumojn
- 27) Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI

28) Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI

29) Daurigado kaj perfektigado de la "Homa Ĉeno"

~~~~~

### **Grupo 3: Kongresoj kaj kongresaĵoj**

21) ILEI-kongreso de Linjano (2023)

22) ILEI-simpozio de Linjano kun la temo

23) Sekva ILEI-kongreso (2024)

26) Instruista trejnado dum la kongreso ktp.

10) Dezirinda okazigado de plua eldono de Premio La Torre

~~~~~

Grupo 4: revuoj kaj ekzamenoj

36) Pripensu pri evoluo de la kotiz-sistemo interalie por kovri la deficiton de la papera servo kaj por ke bazaj/retaj membroj ne pagu por papera servo kiun ili ne bezonas

37) Pripensu de nova formato por IPR (reta/papera) por pli bone taŭgi kun la nunaj bezonoj

38) Pripensu pri la bezonoj de lernejoj instruistoj (membroj kaj ne(ankoraŭ)membroj); ĉu Juna Amiko sufiĉas?; kiaj servoj de ILEI helpus ilin?

8) Ekzamenoj de ILEI/UEA

~~~~~

### **Grupo 5: Instruado**

17) "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la tuta mondo": plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso

18) "Esperanto-kursaro Tibor Sekelj" rete: starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo

19) Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton "30 Oraĵ Horoj" en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon

20) Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la "30 Oraj Horoj" en almenaŭ tri landoj krom Italujo

30) Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj

31) Batali kontraŭ analfabeteco per instruado de Esperanto almenaŭ en unu lando

35) Sendado de lernolibroj al Afriko

~~~~~

Grupo 6: Eksteral rilatoj

32) Sendi observantojn al UNESKO por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kunikleto, 30 Oraj Horoj, Edukado.net)

33) Se eblas, partopreni en la venonta premio Hamdam pri edukado kun taŭga kandidato

34) Pretigi varbadajn materialojn pri ILEI por UNESKO ktp.

~~~~~